# Vertikale

Trimonata periodaĵo por la aktivuloj de FEL

oktobro-decembro 1993

3


## Tijd voor een supranationale taal voor Europa

### Taaldiscriminatie in Europa

Met aandacht heb ik het artikel over het Eurokorps gelezen, in *Het Volk* van 6/7 november.
Als Franstalige Ardenner was ik zeer verbaasd te lezen dat de officiële werktalen van dat Eurokorps maar het Frans en het Duits worden! Waarom wordt het Nederlands terzijde geschoven? In theorie zijn de Europese talen, en dus de Europese volken, gelijk, maar men ziet dat er in de praktijk talen en volken zijn die veel minder gelijk zijn. Het schijnt dat er al Europese *Untermenschen* zijn!
Waarom zo'n schandalige taaldiscriminatie? Volgens mij moet men in het Eurokorps of alle talen van de verschillende nationaliteiten gebruiken, of wel een neutrale, supranationale taal als bijvoorbeeld Esperanto.

**Germain Pirlot**
*Oostende*

In *Het Volk* van 6 november las ik „Eurokorps krijgt orders in Frans en Duits". De geschiedenis wordt herhaald: „Pour les flamands la même chose". Minister Delcroix heeft al de hoop uitgedrukt dat ook het Nederlands zou gebruikt worden. Een Duits officier zei op de televisie dat het gebruik van meer dan twee talen hinderlijk zou zijn voor het geven van orders. Het ligt dan ook voor de hand dat het Nederlands niet zal gebruikt worden. Alle talen zijn gelijk, maar enkele talen zijn „gelijker". Deze beslissing ligt volledig in de lijn van de huidige taalpolitiek in de Europese Gemeenschap. In het geval van het Eurokorps zijn Fransen en Duitsers opgetogen dat ze zichzelf mogen zijn. Dat dit ten nadele uitvalt voor anderen, is dan jammer voor die anderen.
Meertaligheid is voor die mensen dé oplossing. Wordt het niet echt tijd dat men ernstig begint te denken aan het invoeren van een supranationale taal voor de taalcommunicatie in de Europese Gemeenschap? Voor iedereen gelijk. Een rechtvaardige oplossing. Geen taaldiscriminatie. Waar vindt men dat? Bij Esperanto.

**Raymond Wylleman**
*Oostende*

*uit „Het Volk" (13-14 en 20-21 nov. 1993)*

## Flandra Esperanto-Ligo

### Estraro

*Prezidanto:* Alex Humet
*Membroj:*
Roland Rotsaert
Paul Peeraerts
Jos Vandebergh
Pieter Vets
Jorg De Mulder

### Komisiitoj:

*Financoj:*
Roland Rotsaert
Paul Peeraerts
Gerd Jacques
*Eldona agado:*
William Auld
Gerrit Berveling
Chris Declerck
Rejna de Jong
Alex Humet
Paul Peeraerts
*Instruado:* Raymond Wylleman
*Informado:* Edward Symoens
*Dokumentado:* Marc Vanden Bempt
*Rebata servo:* Germain Pirlot

### Oficejo

La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Ĝi estas malferma por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj 12a30 kaj inter la 13a30 kaj 17a30. Vizitantoj bonvolu tamen anticipe interkonsenti pri rendevuo.
Telefono (9-12.30 -- 13.30-17.30h) (03) 234 34 00 - telekopiilo (tagnokte): (03) 233 54 33.

La adresoj de la supraj personoj estas troveblaj en la adresaro malantaŭe en Vertikale. Tie vi ankaŭ trovos la adresojn al kiuj referencas la asteriskoj post kelkies nomo en artikoloj.

## Enkonduko

Inter la finredaktado de la pasinta numero kaj la apero de tiu ĉi nova nia movado ne stagnis. La brusela grupo okazigis belan Zamenhoffeston kun koncerto de Kajto. En kelkaj aliaj kluboj gastis geedzoj Fornal el Polio, li aktoro kaj ŝi historiisto kaj Zamenhof-specialisto. Kalmthout kaj Bruĝo laŭdis siajn respektivajn honorajn membrojn de UEA, Edward Symoens kaj Grégoire Maertens kaj tiel lokis la atenton de la komunikiloj sur Esperanton. Fine Paco kaj Justeco organizis prestiĝan feston de internaciaj paroj, kiu ankaŭ eĥois en la gazetaro.
Tamen pri ne unu el tiuj ĉi sukcesoj vi ion legos en ĉi numero. Estas iom mirige ke eĉ pri bonaj aferoj estas silentata. Ne estu tiel. En Vertikale estu legeble kiujn sukcesojn kaj kiujn malsukcesojn (!) spertis samideanoj aliloke. Estas ege grave scii tion, ĉar sukcesoj en la movado kuraĝigas nin daŭrigi la propran agadon kaj el malsukcesoj ni povas lerni kiel ne agi por progresi.
Kvankam mi akceptis respondeci pri la informfluo ene de FEL, mi ne povas propramane raporti pri ĉio kio okazas. Eĉ se mi ĉeestis kelkajn el la supre listigitaj aktivecoj, mi ankoraŭ estas tempe limigita (Vertikale ja ne estas mia sola okupo en la movado). Do, estimataj aktivuloj, sekretarioj kaj prezidantoj de kluboj, bv. sendi al la redakcio raporton pri kio okazis kaj okazos pri Esperanto en via medio. Estu konciza artikolo, do ne estas granda laboro. Ne estas la celo kaŝi plej eble multon, sed male, komuniki vian agadon al la aktivularo, la legantaro de Vertikale. Tiel ni progresu, per harmonia tutlanda kunlaboro!

## Uzado

### Okazos

**Cseh-seminario NL - Mila vd Horst-Kolinska**

Pro alveno de s-ino Katalin Smidéliusz el Hungario, IEI organizos Cseh-seminarion en januaro 1994 de la 10a ĝis la 15a inkluzive, ĉiutage de la 10h ĝis la 15h. La kosto de la seminario estas 80 guldenoj. Ĝi inkluzivas helpmaterialon, atestilon kaj trinkaĵojn dum la paŭzoj. Aliĝojn kun pago akceptas Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Riouwstraat 172, 162626 Den Haag. Por maksimume profiti tiun intensivan seminarion, la partoprenontoj ne nur posedu BCK-libron (minimume la 7an eldonon) sed ankaŭ konu la enhavon.

## Informado

**"Daar hoor je tegenwoordig niet veel meer van" (jdm)**

Jen ofte aŭdita eldiro de la senscia amaso. Ke ne devas esti tiel pruvas la gazeteltondaĵoj sur la kovrilpaĝo, verkitaj de du rebatemaj esperantistoj. Ĉu ankaŭ vi sukcesis aperigi esperantorilatan artikolon? Ne forgesu sendi kopion al la redakcio, por la arĥivo. Rebatendajn artikolojn sendu tuj al la kunordiganto Germain Pirlot(*).

**Eŭska kverko naskiĝis (jdm)**

Aprile de ĉi jaro ekaperis nova revuo en Esperantujo: eŭska kverko. Ĝi estas socikultura do nemovada revuo kiu belege spegulas eŭskian politikon kaj kulturon. La 28 recirkulitaj paĝoj prezentas profesiecan enpaĝigon kun tre multaj altkvalitaj nigrablankaj fotoj. Ankaŭ lingve kaj enhave la kvarmonata revuo tre plaĉas, en la tria numero troviĝas ekz. interesa artikolo pri la eŭska lingvo kaj estas promesita rubriko pri tiu temo.

Sufiĉe mirige abono de tiu ĉi altkvalita revuo kostas nur 15 guldenojn, por studentoj kaj senlaboruloj eĉ nur 9 (pagenda al UEA-konto kver-j). Ĉu vi interesiĝas? Petu do senpagan provnumeron de la administrejo(*).

**Kion fari por rebati en la gazetaro? (gp)**

*Konstato*

Pli ma'pli regule aperas artikoloj, kiuj kritikas Esperanton aŭ misinformas pri ĝi.

*Kion ni faru?*

- TUJ reagi.
- Senprokraste diskonigi tiun artikolon, fotokopie aŭ telefone, al seriozaj, kompetentaj samideanoj por ke ankaŭ ili reagu.

NEPRAS klare sciigi la titolon de la revuo/ĵurnalo

- aperdaton de la artikolo
- kompletan adreson de la gazeto

*Kiel reagi?*

1. Ni bone konsciu, ke ĝenerale homoj negative skribas pri Eo ĉar ili ne estas bone informitaj; pri tiu bedaŭrinda situacio kulpas grandparte la esperantistoj mem!
2. NEPRE ni evitu polemikon kaj akran esprimmanieron; tio ĉiam malbonege impresas kaj ofte malebligas postajn kontaktojn.
3. Pli ol rebati ni atentigu pri eraroj, zorgante pri afabla etoso. Ekzemple:
*"Pri tiu ĉi punkto oni erare informis vin. Fakte la realo estas alia..."*
*"Kiel vi povas konstati ankaŭ laŭ aldonita dokumento..."*
4. Laŭeble ni aldonu fotokopion de dokumentoj, kiuj plifortigos niajn argumentojn, kaj ni substreku la plej gravajn frazojn.
5. Preferinde ni respondu per precizaj argumentoj, plej eble freŝdataj kaj ĝisdatigitaj, baziĝante sur seriozaj referencoj:
   - instituto, universitato: estas atesto pri kredindeco
   - titolita persono: oni kredas pli facile Prof. D-ron B. ol S-ron Z., eĉ se temas pri la samaj ideoj.
6. Anstataŭ rebati ĉiujn punktojn, ni elektu unu aŭ du, pri kiu(j) ni havas fortikajn, kontroleblajn argumentojn.



rim.: kiu deziras refuti ĉiujn punktojn povas fari tion per pluraj leteroj; eblas ankaŭ sendi ilin nome de aliaj personoj, kun ilia konsento kompreneble (aŭ donante al ili la sendotan tekston); tiam nepras diversigi la stilon, dokumentojn, prezentadon.

7. Ĝenerale mallonga letero estas pli facile publikigita: ideala longeco estas 20 linioj; trafega fakto pli valoras ol dupaĝa babilado.
8. Se la aŭtoro de la artikolo ne estas ĵurnalisto, ni aldonu (foto)kopion de nia letero, petante de la ĉefredaktisto ke li transsendu ĝin al la aŭtoro, kiun tiamaniere ni povos kontakti kaj kun kiu eblos eventuale ekdialogi.

> **InformOKazo**
>
> Mi studas lingvojn en instituto por tradukistoj. Iun tagon ni devis ruslingve prezenti nian ŝatatan au'toron. Mi elektis Claude Piron, konsciante ke tiel eblas subtile tuŝi Esperanton, parolante pri ĝia literaturo. En la biografio mi menciis interalie ke li estas denaska esperantisto kaj kiuj verkoj de li aperis (originale) en Esperanto. Ŝajne mia subjekto estis sufiĉe interesa, ĉar venis certe duoble pli da demandoj ol ĉe aliaj studentoj. Feliĉe la docento lasis al mi sufiĉe da tempo por (balbute) respondi ilin. Malgraŭ la nur unujara studado de la rusa, mi sukcesis pli malpli klare komuniki ke Esperanto ne volas anstataŭi naciajn lingvojn nek malstimuli lernadon de fremdlingvoj.

9. Ni skribu legeble -preferinde letero estu tajpita- kaj klare ni menciu niajn nomon kaj kompletan adreson.
10. Finfine ni komprenu, ke ĵurnalo ne povas aperigi la dekojn da leteroj, kiujn ĝi ricevas ĉiutage; nur la plej trafaj, la plej interesaj havas ŝancon veki intereson kaj esti publikigitaj. Tamen, ju pli multaj leteroj pritraktas temon, des pli malfacile ĵurnalo povas neglekti tiun temon.
11. Se nia letero estas publikigita, NEPRE ni danku! Temas pri elementa edukiteco kaj estas okazo por sendi plian argumenton.

*Ĉu malfrua reago utilas?*

JES! Eĉ post semajnoj aŭ monatoj reagoj ĉiam bonvenas kaj utilas, sed tiam ni komencu nian leteron alimaniere. Ekzemple:

*"Kolego mia ĵus sendis al mi vian revuon, en kiu vi (aŭ X.) skribas pri..."*
*"Ekde pluraj tagoj mi intencas skribi al vi pri..."*
*"Mi kaptas feritagojn por..."*
*"Lasttempe estis publikigita en via ĵurnalo artikolo pri..."*
*"Ĉe mia dentisto (frizisto,...) mi legis en via revuo ke..."*

*Atentu!!*

Se ni nur supraĵe konas la rebatotan temon, ni turnu nin al kompetentulo kaj bone informiĝu antaŭ ol skribi.

Kelkfoje preferindas silenti ol misargumenti!

**Rudolf Carnap kiel esperantisto - U Matthias**

Antaŭ kelkaj monatoj germana eldonejo *Reklam-Verlag* aperigis la libron *Mein Weg in die Philosophie* (Mia vojo en la filozofion) de Rudolf Carnap (1891-1970). Ĝi estas traduko de anglalingva aŭtobiografio de la fama filozofo el la jaro 1963. Krom eseoj pri "Ŝajnoproblemoj", "La fundamentoj de la matematiko", "Probablo kaj indukta logiko" kaj multo plia, ĝi enhavas ĉapitron pri "Lingvoplanado". Tiun temon Carnap traktas ne nur el teoria vidpunkto, li rakontas ankaŭ pri personaj spertoj kiel esperantisto. Indas, ke esperantistoj konu kelkajn liajn citaĵojn ĉi-rilate.

"Kiam mi havis ĉirkaŭ 14 jarojn, eta broŝuro kun la titolo *La mondolingvo Esperanto* falis en miajn manojn. Mi tuj entuziasmiĝis pri la reguleco kaj la genia strukturo de tiu lingvo, kiun mi avide lernis. Kiam kelkajn jarojn poste mi vizitis internacian esperantokongreson, ŝajnis al mi kvazaŭ miraklo, kiam mi rimarkis ke facile mi povis sekvi la paroladojn kaj diskutojn en la grandaj publikaj kunsidoj, kaj paroli en personaj konversacioj kun eksterlandanoj el multaj landoj, dum interparolon en tiuj lingvoj, kiujn mi lernis en la lernejo, mi ne sukcesis efektivigi".
Carnap daŭrigas raportante pri la "kortuŝa kaj edifa travivaĵo" spekti teatraĵon *Ifigenio* de Goethe en Esperanto kaj rakontas pri sia partopreno en la UK en Helsinki en 1922 kaj pri la posta peresperanta vojaĝo en la baltaj landoj. Por li "tiu lingvo ne estis nur sistemo de reguloj, sed simple vivanta lingvo".

Pro tiuj spertoj Carnap fine replikas al la antaŭjuĝo ke internacia lingvo ne taŭgas por personaj diskutoj aŭ literaturaj celoj. Lia argumentado similas al tiu de bona esperantoinformilo. Estas agrable ke nin apogas unu el la plej grandaj filozofoj de tiu ĉi jarcento. (El Eventoj 2/dec 93).

**TANEF grupigas la naturamikojn esperantistajn**
La Migranto estas la ligilo de TANEF kaj aperas kvarfoje en la jaro. La fakreferanto por Belgio, Valonio kaj Flandrio estas Eric Baert(*). Se vi volas (re)aboni La Migranton, bv. pagi 230 BEF je la sama adreso, bankkonto 271-0265305-42. (El dumonata informilo de La Konko).

## Varbado

**Merkatado**

**Trarigardo de Fleja-membraro - sep 93 (jdm)**
Prepare al MEJK (MezEŭropa Junulara Konferenco) mi faris perkomputilan esploron de la Fleja-membraro, t.e. per legado de la donitaĵoj en la FEL-komputilo fari bildon de niaj anoj. Certe tiu bildo estas ne perfekte akurata, sed probable ja reprezenta.

> **Aĉeteblas:**
> fotokopiilo en tre bona stato. Prezon interkonsentu. Telefonu por informoj: (03) 234 34 00

De 96 membroj proksimume la duono regas Esperanton. Dudeko de tiuj esperantistoj efektive aktive uzas la lingvon per vizito de renkontiĝoj aŭ kluba vivo. Inter la neesperantistoj kelkaj verŝajne estas nejamuloj, ĉar ili estas tro junaj aŭ lernantaj la lingvon. 17 Fleja-anoj havas malpli ol 7 jarojn. Aliaj familiaj membroj fojfoje estas nur administraj membroj, ĉar ili neniam interesiĝis pri la lingvo sed nur membras ĉar la gepatroj pagis kotizon.
Kiuj do estas "interesaj membroj"? Verŝajne precipe tiuj esperantistoj kiuj ja regas la lingvon sed ne engaĝiĝis en la movado, do dudeko da.
Kiel klarigeblas ke falis la membronombro sub cent? Unue pro natura malkresko: Se neniu varbas novajn membrojn, malkreskas la nombro ĉiujare ĉar maljuniĝas homoj kaj transiras al FEL. Dua kaj grava kialo: multaj anoj ne rekotizis. Per bona varbsistemo eblas eviti aŭ almenaŭ malpliigi tiun forfalon. Ĉu ĉi-jare la malkresko esti tiel granda ĉar FEL ne sendis memorigilojn al la nekotizintoj? Diablo scias.




## Membrecoj FEL

1. Totala membronombro :

En la "Manlibro por Esperanto-aktivuloj" troviĝas detalaj statistikoj pri membreco kaj abonoj. La nombrojn de FEL-, FLEJA- kaj UEA-membroj sekvas la nombroj de abonantoj al diversaj revuoj. Ankaŭ troviĝas tie la membronombroj de la diversaj lokaj grupoj de FEL aparte. La listo estas kompleta de la jaro 1982 ĝis nun. Tie ĉi mi donas superrigardon pri la membreco de FEL.

Unue, se la redaktoro de Vertikale tion enmetas, sekvas grafiko pri la evoluo de la totalaj membronombroj tra tiuj jaroj (enestas kelkaj negravaj eraroj en la statistiko).

Membronombro FEL + FLEJA




2. Rilato kun kotizo :

En tio troviĝas kelkaj malpliaItiĝoj : 1983 (- 21%), 1988 (- 19%) kaj 1991 (- 17%). Aliflanke estis forta pliaItiĝo (+ 19%) en 1987.

La kialoj por tio ne estas malfacile troveblaj.

La membreco de FEL ĝis 1981 kostis pli ol simpla abono al Esperanto Panorama. Tiu lasta kostis 50 fr, en 1981 60 fr. En 1982 same FEL-membroj kiel Panorama-abonantoj pagis 100 fr.

Sed jam en 1983 tio pliaItiĝis al 200 fr. Sekvo de tio estis la unua malpliaItiĝo de la membronombro. La nombro kreskis denove, al rekordo en la jubilea jaro 1987. La fino de la jubileo kongruis kun nova pliaItiĝo de la kotizo al 400 fr.

La klarigon por la malpliaItiĝo en 1991 mi ne retrovas.

Nun, en 1994, la membrokotizo denove pliaItiĝas, al 600 fr. Se la historio ripetiĝos, denove malpliaItiĝo de la membronombro estu atendata.
Tamen la efikon povas malpliigi la fakto ke jam ekde novembro la grupoj varbas membrojn, ĝis fine de 1993 je la malnova kotizo. Tiel la malpliaItiĝo de la membronombro estos dividata inter 1994 kaj 1995. Ni vidu !

3. Membroj el la grupoj :

En la Manlibro la statistiko pri la

unuopaj grupoj plejofte ne enkalkulis la FLEJA-membroj en la FEL-nombro. Tion mi jes faris ĉi-supre. Tamen la evoluo de la membreco estas sendependa de tio : la FLEJA-nombro ĉiam estas pli-malpli sepono de la tuta FEL-nombro.

Tra la jaroj la grupo el Antverpeno ĉiam estis kaj estas la plej granda el ĉiuj : ĉiam inter 21% (1986) kaj 31% (1992) de la tuto.

Pluraj grupoj en kelkaj jaroj liveris 10% aŭ pli el la tuta membronombro. Jen la kompleta listo de 1982 ĝis 1993 (krom Antverpeno) :

- Kortrijk, 1987 (11%), 1988 (15%), 1989 (15%), 1990 (14%), 1991 (12%), 1992 (10%), 1993 (12%)
- Limburg, 1988 (10%), 1990 (11%), 1991 (14%), 1992 (15%), 1993 (13%)
- Leuven, 1987 (10%), 1993 (10%)
- Gent, 1988 (10%), 1993 (10%)

3. <u>Grandaj lokaj grupoj :</u>

La "top 5" en FEL estis :

- 1982 : Antverpeno, Bruĝo, Kortrijk, Limburg, Leuven
- 1983 : Antverpeno, Bruĝo, Kortrijk, Limburg, Kalmthout
- 1984 : Antverpeno, Bruĝo, Leuven, Aalst, Limburg
- 1985 : Antverpeno, Leuven, Bruĝo, Limburg, Aalst
- 1986 : Antverpeno, Leuven, Bruĝo, Limburg, Aalst
- 1987 : Antverpeno, Leuven, Limburg, Kortrijk, Aalst
- 1988 : Antverpeno, Kortrijk, Leuven, Gent, Limburg
- 1989 : Antverpeno, Kortrijk, Leuven, Limburg, Gent
- 1990 : Antverpeno, Kortrijk, Limburg, Leuven, Gent
- 1991 : Antverpeno, Limburg, Kortrijk, Leuven, Bruĝo
- 1992 : Antverpeno, Limburg, Kortrijk, Leuven, Bruĝo
- 1993 : Antverpeno, Limburg, Kortrijk, Leuven, Gent

Evidente la samaj grupoj do ĉiam revenas.

Tial ni kunmetis la sinsekvon tra tiuj 12 jaroj :

1. Antverpeno (+ Mortsel, Wilrijk) - 174
2. Limburgo - 64
3. Kortrijk - 64
4. Leuven (+ Mechelen, Halle) - 62
5. Bruĝo (2 grupoj kune) - 53
6. Gent (+ St. Niklaas) - 41
7. Kalmthout - 36
8. Aalst - 35
9. Bruselo - 27
10. Oostende - 17
11. Knokke (aŭ Blankenberge) - 5

La nombroj indikas la mezan membronombron. Tiuj kaj la sinsekvo estas indiko : ne ĉiam kun FLEJA-membroj kaj kelkaj nekorektaj ciferoj. Sed la eraro estas malgranda.
Rimarku ke ni kunmetis plurajn lokajn grupojn en unu gruparo : tio okazis pro ĉeso de la grupaj aktivecoj en Mortsel, Wilrijk, ktp.

Marc Vanden Bempt



## Interne

**Fleja-estrarkunsido - 24 sep 93 (yn)**
Ĉeestas: Stefaan Cottenier, Wim Slootmans, Jorg De Mulder, Yves Nevelsteen kaj parte Eddy Van den Bosch

1. Al la kunsidoj ni invitos estonte nur estraranojn, krom se la estraro decidas sufiĉe frue antaŭ la kunsidodato ke kunĉeestonto povas pliriĉigi la diskutojn kaj iel garantii aktivan kunlaboron. Ni preferas simple paroli pri seriozaj aferoj pli intense kun malgranda grupo ol havi distran babiladon. La kunsidoj ne estos fermaj, ni informos la aktivularon pere de Vertikale pri kunsidodato kaj enmetos en tiun revuon ĉiufoje etan raporton. Se iu interesiĝas pri la estraro, li/ŝi povas kontakti nin.

2. Grava demando estas daŭre: kiamaniere ni disvastigu la novan broŝuron? Aŭtomate ĉiu informpetinto ĉe la esperantocentro ricevos ĝin kaj estas planoj sendi ekzempleron al gazetoj kaj revuoj. Certe kunportu kelkajn ekzemplerojn post la kunsido por disdoni al viaj amikoj-interesitoj.

3. Pro la daŭra malkresko de nia membraro (nun 96), ni ĉijare nur rajtas je unu komitatano. Oficiale tiu estas Pieter sed Jorg anstataŭis lin en Bulgario. Prepare al MEJK Jorg iom esploris la membraron. Kelkajn informojn vi trovos en ĉi tiu numero.

4. En Kalmthout ne eblas organizi FLEJA-semajnfinon, sed Els De Vleeschauwer trovis taŭgan, malmultekostan kaj per la publika transporto facile atingeblan ejon en la okcidentflandria Melle.

5. Yves estos ekde la sekva numero kunĉefredaktoro de JEN. Post kelkaj jaroj de "flandra kunlaboro al nederlanda JEN", finfine estas denove ekvilibro inter la du landoj. Se vi havas publikigindaĵojn, ne hezitu sendi ilin al la koncerna adreso aŭ lasi ilin en la esperantocentro kie la redaktoro havas leterkeston.

**FLEJA-kunsido - 27 nov 93 (yn+jdm)**
Ĉeestas: Jorg De Mulder, Els De Vleeschauwer, Wim Slootmans, Stefaan Cottenier, Yves Nevelsteen kaj parte Eddy Van den Bosch

1. Fleja-semajnfino
Dato: lasta semajnfino de aprilo.
Ejo
Els trovis ejon je 500m de la stacidomo en Melle. Kostos pli malpli 5000 BEF por 40 personoj kaj antaŭpago jam estas pagita. Se estus pliaj partoprenantoj, eblas dormi surplanke aŭ improvizi ion alian. Sekve: ju pli da venos, des pli malmultekoste estos por ĉiuj. Tre grave estas ke vi devas kunporti littukojn aŭ krompagi. Ne estas permesite uzi nur dormosakon.
Els ĉefrespondecas, metos e-signojn sur la stratoj kaj povas esti en Melle jam je la kvara aŭ eĉ pli frue. Si povas ankaŭ dimanĉe resti ĝisfine.

Asekuro: Yves kontaktos An, ĉar ŝi spertas de la lastaj semajnfinoj.

Administrado: Yves zorgos por la aliĝiloj kaj disvastigos ilin en la Esperantogazetaro. Els kaj aliaj kompreneble ja invitu kelkajn persone. Sciigon al ĵurnaloj kaj al loka radistacio prizorgos Els (ŝi estas lokulino).

Manĝado: la gepatroj de Yves pretas antaŭ la semajnfino jam frostigi supon. Ankaŭ Els povas anticipe ion prepari kaj surloke aĉeti aferojn. Jorg respondecas pri vegetara manĝo.

Programo
Stefaan okupiĝos pri la programo, do sendu ĉiujn proponojn al li. Jam estas ideo pri horora programo: Els havas "tian"

muzikon kaj Stefaan serĉos preleganton pri fantomoj (aŭ mem iom lernos) + rakontoj. Krome estos Yves kaj Wim kiuj prelegos pri komputiloj (modemo-Internet), popoldancoj kaj eble promeno tra universitata ĝardeno. Els kaj Jorg kunportus muzikilojn kaj pripensos kion eblas fari rilate kantadon. Ni disponos pri biljarttablo kaj intencas organizi tutsemajnfinan biljartkonkurson.

2) MEJK - OKEJ
Jorg kaj Yves ne raportis pri Svisio, ĉar ankoraŭ ne alvenis la protokolo. OKEJ (Okcidenta Konferenco de la Esperanto-Junularo) okazos de la 14a ĝis la 17a de aprilo, do 14 tagojn antaŭ la semajnfino. Ivo Durwael atentigis ke eblas loĝigi la partoprenontojn (15on da) ĉe esperantistoj. Unue ni pensis pri dormado en la esperantocentro mem, sed Ivo rakontis ke estas malfacile dormi kaj kunsidi en la sama loko (aero matene estas sufoka, kie meti la dormilojn dumtage?, nur unu duŝo, ktp). Ja vendredvespere ne eblas kunsidi (pro klubvespero de la Verda Stelo) do tiam ni eble eniru la urbon. Jorg informiĝos pri subvencieبloj.

3) Koncize
Antaŭe estis decidite ke ĉiu kiu ŝatus estonte ricevi ĝin, pagu 100 BEF, sed por ke novuloj kontaktiĝu kun ĝi, ni sendos tamen provnumeron kun slipon por peti ĉu ili ŝatus daŭre ricevi ĝin.

4) Subtegmento de la esperantocentro
Ekestis la sento ke necesas pli bone konatiĝi kun la flandraj gesamideanoj. Ankaŭ Patricia (de Pieter V) tion opiniis kaj foje jam kelkaj Fleja-anoj kune iris kegloludi. Jorg babilante kun Gerd Jacques eksciis ke iame Fleja-membroj kunvenis regule en la subtegmento de la centro kaj tuj entuziasmiĝis pri la ideo. Post opinisondo inter la ĉeestantoj montriĝas ĝenerala enflamiĝo, precipe de Els kaj Yves. Ni supreniras por rigardi la promesplenan ejon kaj tiuj kiuj ankoraŭ ne vidis ĝin estas ravitaj. Els kaj Yves devas kuri la trajnon, Wim kaj Jorg en la unua etaĝo alparolas Ivon, la komisiiton pri la domo kaj li kuraĝigas nin certe realigi nian planon, profitetante la okazon peti nian helpon forigi la tie troviĝantan rubon por eterne.

5) Kotizo
Ĉar FEL plialtigos la kotizon, ni demandos ilin transdoni al ni pli grandan parton, nome 250 BEF anstataŭ 150 (tiom la kluboj ankaŭ ricevos).

**Algemene Vergadering "De Drij Berlengs" - 13 sep 93 (jv)**
Aanwezig: J Vandebergh (voorzitter), A Lijnen (secretaris), Chr en K Bruyninckx, I Declercq, L Geysmans, P Achten, H Schutters, P Goewie, Th Geerdens en H Pluymers
Verontschuldigd: D Vanparijs

- *Gebruikte taal:* alhoewel iedereen ervan overtuigd is dat we zoveel mogelijk Esperanto moeten gebruiken onder esperantisten, besluiten we toch in deze constructieve vergadering Nederlands te spreken. Hier zijn de beslissingen belangrijker dan de gebruikte taal en wordt op deze manier aan de nieuwelingen of niet-esperantisten, die ook volwaardig lid kunnen zijn, de kans gegeven om ook hun mening te uiten.

- *Verkiezing nieuw bestuur:*
Voorziter: Jos Vandebergh
Secretaris: Alfons Lijnen
PR-man: Peter Achten

- *Varia:*
Er wordt gevraagd regels op te stellen tot harmonisering van de Limburgse clubs. Voor wat betreft de cursussen, de clubactiviteiten, reclamevoering, gebruikte handboeken enz.:
* Er wordt voorgesteld brieven te schrijven van groep X naar groep Y.
* Men stelt voor vanaf nu actief te werken in de clubvergaderingen.
(parto de protokolo de ĝenerala kunsido de Houthalen).



**Speciala ĝenerala kunveno de FEL - 20 nov 93 (ah)**
Ĉeestis reprezentantoj de la grupoj de Antverpeno (J Bovendeerd, J Schram, I Durwael), Bruĝo (J Van Eeno), Gento (A kaj K Lödör), Kalmthout (M Storms, S De Weerd), Kortrijk (J Hanssens, JP Allewaert), Loveno (M Vanden Bempt, ges. Jacobs), Oostende (R Wylleman); fervojistoj (L de Sutter), Fleja (W Slootmans, J De Mulder), estraro (R Rotsaert, P Vets, A Humet - protokolanto) kaj de la centro (P Peeraerts, G Jacques kaj G van Damme), H De Ceuninck, R Oost kaj C Tondise (?? el Ieper, Kortrijk??). Reprezentantoj de Hasselt kaj Peer senkulpigis sin.

0. Speciale malbona financa situacio de FEL devigis la prezidanton kunvoki specialan kunvenon.

1. Financoj de FEL : RR kaj PP klarigas la kaŭzojn de la malbonfarto, jam skizitajn en la protokolo de la oktobra estrarkunsido. Necesaj investoj dum 1993 (nova komputilo - la malnova vendiĝis je 5000 BEF!, nova telefonsistemo); malpli da vendoj en la libroservo : propraj/nepropraj libroj kaj kursoj; malpli da grafikaj laboroj por eksteruloj; nova AVI-sistemo en EK. Ĉiuj el tiuj eroj okazigis trueton je centmilo da frankoj. Tamen la tuta truo atingas unu milionon. Problemo estas ke temas pri fundamenta ekonomia krizo en la asocio. Solvoj ne vidiĝas tuj. Sugestoj por plibonigi la financojn : deponoj kun aŭ sen intereso (verdaj kontoj), "krekelsparen" de ASLK, donacaj kartoj. Ankaŭ pli da volontula laboro por taskoj kiuj nun estas faritaj en la centro donus pli da tempo al la homoj tie por pli enspezigaj laboroj. Ekzemple Horizontaal estas preskaŭ tute farita de unu homo (GvD). Aktiva partopreno de kunlaborantoj estus utila.
Laŭ GJ temas pri cirklo fermita, ni sanĝu metodojn kaj rompu la cirklon!

2. Strategiaj demandoj : PV prezentis modelon de sin-financaj projektoj, kiuj malfermu la vojon por la estonta agado de la asocio. En la realigo de projektoj kiaj kursoj, vojaĝoj k.a. estu detala pristudo de ĉiuj faktoroj kiuj influas la spezojn.
JS opinias ke ni havas maltro da "kl' ntoj", kaj ke ni do devas iri vojon por havi novajn.
Laŭ KL ni ne sufiĉe elradias al la ekstero. Ekzemple ni povus havi montrofenestrojn.
JVE opinias ke ne estas nur afero de la centro, sed unue de la lokaj grupoj kiuj devas fari la bazan laboron.
Laŭ RW ni devas pli bone atenti subvenciojn por lokaj grupoj.
HDC ŝatus elradii al "aliaj" klientoj kiaj skoltoj ks.
PV rekomendas ke ni unue esploru kion ni JAM havas. Ni ankaŭ havu novan strategion rilate ekzemple la kolektadon de adresoj (vd VT 1992 "Kiom valoras adreso").

3. Nova kotizsistemo : AH proponis altigon de kotizo al 600 BF. Regulo aplikiĝu por kotizoj enkasigotaj post la 1a de januaro 1994. Sekvas diskuto ĉu la asembleo rajtas okupiĝi pri la temo. Finfine ni konsentas jese. Estas opinioj por ne altigi pro la nepra perdo de membroj kiu sekvas ĉiun altigon. Tamen estas ĝenerala konsento ke la kotizo estas tro malalta. Fine ĝi akceptiĝas.

4. Horizontaal - la kontribuo de lokaj kluboj : GvD alvokas la aktivulojn aktive

kontribui al HT. Li ŝatus ke kelkaj homoj sin devigas liveri seson da artikoloj por unu rubriko dum unu jaro. KANDIDATOJ anoncu sin.
JVE proponas ke la lokaj grupoj liveru pli grandan parton de la kontribuoj.
AH proponas ke kelkaj grupoj respondecu pri unuopaj paĝoj. Kiel materialo estus ebla la uzado de tekstoj kiuj povus interesi pli grandan publikon, preparitaj por aperi en la grupaj gazetoj. La redaktoroj de la lokaj gazetoj mem kontaktu GvD kaj proponu tiujn tekstojn.
HDC proponas inventaron de artikoloj aperintaj en revuoj.
JDM konsentas ke HT estu laboro de aktivularo, sed se ne sukcesas fari ĝin pli interesa, ni nuligu ĝin tiel ke GvD povu plene dediĉi sin al enspezigaj laboroj kiel librokompostado.

5. Vertikale - la komunikado ene de FEL : JDM redaktis la revuon ekde la dua numero. La celo de VT estu analize (do, vertikale) pritrakti la aferojn pri kaj ĉirkaŭ Eo kaj la agantoj. Male al tio, HT disvastige, horizontale, pritraktu la informojn.

6. Oficejo de FEL : Pro tio ke estis/as tendenco identigi la antverpenan oficejon kun FEL, AH insistas je tio, ke ni distingu inter la oficejo de FFL en Anverpeno (ni nomu ĝin "centro") kaj la tuta FEL, kiu ja baziĝas sur la lokaj grupoj, membroj, aktivuloj kaj kompreneble la centro en Antverpeno.

7. Domo en Antverpeno: ID, komisiito pri la domo, faradas individuajn enketojn pri la deziroj/opinioj de la aktivuloj rilate la domon en Antverpeno. Per la rezulto de tia enketo li ellaboros planon por pli efike uzi la konstruaĵon en Antverpeno.

8. Estraro de FEL - la reprezentiĝo de lokaj kluboj - estonta prezidanto : AH anoncas sian rezignon je prezidanteco ekde la venonta laborperiodo.
AH opinias ke en la estraro devus reprezentiĝi tuta FEL (lokaj grupoj kaj la centro). Tiel li pledas por estraro kiu havu almenaŭ unu reprezentanton de ĉiu grupo kiu povu gvidi la ĝeneralan agadon de FEL. Tiu estraro devus kunveni nur tri/kvar-foje jare. Malgranda laborgrupo el la estraro okupiĝu pri la mastrumado kaj financoj. Tiu grupo kunsidu ĉiumonate.

**Estrarkunveno de FEL - 17 dec 93**
Partoprenis : Paul Peeraerts, Gerd Jacques, Roland Rotsaert kaj Alex Humet (protokolanto).

Temas pri interna kunveno, t.e. nur pri mastrumado de la centro.

0. Fine de novembro mortis en Kortrijk aktivulo Jan Hanssens, nur semajnon post partopreno en la Ĝenerala Kunveno je 20 nov 1993. La estraro kondolencas la grupon de Kortrijk kaj la tutan asocion pro la perdo de tiel eminenta esperantisto. Kortrijk perdis du kolonojn en iom pli ol unu jaro kaj iel restas orfa. Havu kuraĝon la aktivuloj en Kortrijk por daŭrigi la poresperantan laboron!

1. Financoj : RR k GJ analizis la spezojn por 1993 per ciferoj haveblaj ĝis la fino de novembro. Post la repreno de la rezervo kreita pasintjare per la profito (BF 400.000), restos elportebla malgajno de kelkcent mil belgaj frankoj.

2. Laboroj de la Centro : dum la lastaj semajnoj la centro estis plenokupita per ĉiaj laboroj. Problemo : relative alta kvanto de ne-enspezigaj taskoj kiel ekzemple informpetoj. Du homoj malsanis, do Horizontaal, kiu estas prespreta, presiĝos malfrue.



3. Monato : Nuna kampanjo celas 2.000 adresojn en Usono, Svedio, Francio kaj Britio. Abonontoj ricevos senpagan libron. Reagis positive 40 homoj. Dua alvoko al ne-reagintoj ekmontriĝas pli sukcesa (pli ol 10 novaj abonantoj en nur kelkaj tagoj). Monato, kiu nun estas sanigita finance, devus atingi 2.000 abonantojn por doni ian marĝenon al FEL - en 1992 estis apenaŭ 1.800. ATENTU BONE : Tiuj kluboj kiuj por 1994 alportos kaj enkasigos Monato-kotizojn de personoj kiuj ĝis nun ne abonis, ricevos 250 BEF (anstataŭ la ĝisnunaj 125). Ankau Sonorilo rajtos je tiuj kondiĉoj. Abonprezo estas nun por Belgio 1.250 BF. Kvankam Monato esta ne-deficita, PP devas investi tro multe da tempo (jam enkalkulita en la kostoj de Monato), pro la misfunkcio de manpleno de redaktoroj kiuj transdonas ne-redaktitajn kaj ne-korektitajn tekstojn. Positive estas, ke ankaŭ manpleno de redaktoroj ekuzis la elektronikan poŝton kiu estas kaj rapida kaj malmultekosta (la centro ekspedas ĉiutage elektronikan poŝton al pluraj redaktoroj kaj kunlaborantoj je 10 BF tage). Per tiu sistemo ankaŭ sukcese funkcias la provlegado. Troviĝas provlegantoj en H, Uzb, I, Rus, SF, GB kaj B (3). Krom la belgoj (!) ĉiuj aliaj tuj ricevas la provlegaĵojn elektronike tra la telefona reto.

4. Eldonoj : Tri libroj aperis en 1993. Kanto pri Minotaŭro de G Berveling, 500 ekz. vendoprezo 450 BF. Mempraktikilo por Gramatiko ABC, de E Van Damme, 1000 ekz je 450 BF. Kaj Nuda feino de L Vermeiren en traduko de I Durwael; 700 ekz je 690 BF. Por tiu lasta la aŭtoro mem prunte investis la monon.
AH opinias, ke FEL devus bazi sian dezireble ne-deficitan ekonomion sur du stabilaj kolonoj : Monato kaj eldonado. Se je la unua mankas ducento da abonoj por spiri, je la dua la situacio estas pli sufoka. Kvankam estas longa vico da libroj por eldono, tute ne eblas nun meti limdatojn pro la manko de tempo de la kompetentaj personoj en la centro. FEL devus eldoni ses librojn jare, el kiuj nepre unu sukcesaĵo. En-vica Gramatiko ABC de E Van Damme estus tia sukceso. Ĝi aperu kiel eble plej baldaŭ.

5. Libroservo : Partopreno en Bruselo estis sukcesa (30.000 BF). Bedaŭrinde ŝteliĝis varoj je valoro de 2.000 BF.

6. Horizontaal : Malfruo januara pro malsano de la presisto. La kunsidantoj proponas aperigi 5 numerojn jam ekde 1994. Kialoj : a. Forigi jarfinan kolapson de pluraj revuoj. b. Malpezigi la kompostistan ne tuj enspezigan laboron, eventuale uzeblan por libro-eldonado.
La numeroj estus jan-feb aperonta je la 15a de jan (anstataŭ la 1an), mar-apr-maj aperonta je la 15a de marto (ans. la 1an), jun-jul-aug aperonta je la 1a jun, sep-okt aperonta je la 15 de aug, kaj nov-dec aperonta je la 1a nov.
Limdatoj de ricevo de tekstoj en la centro : a. por normalaj tekstoj 4 semajnojn antaŭ la aperdato, b. por kalendaro ĝis 2 semajnoj antaŭ la apero.
La nuna numero jan-feb estu sendita nur al membroj inter 1989 kaj 1993 (anstataŭ al ĉiuj iamaj membroj) kaj nur al informpetintoj dum 1993 (anstataŭ al ĉiuj informpetintoj). Tiel ni reduktos la kostojn de tiu numero je duono. Ni statistiku pri la rezulto de tiu decido kompare al pasintaj jaroj. La propono pri 5 numeroj ne estas ankoraŭ decidita. Nin urĝe interesas konstruaj opinioj de la grupoj kaj membroj! Bonvolu prefere skribi vian opinion kaj tuj sendi ĝin al la centro.

7. La jaro : pro ŝtopiĝo jarfina ne jam estas preta. Presiĝis je 800 ekz. Konsterno. Venontjare ĝi estu presita en septembro!

8. "Teletext" : FEL ricevis proponon aliĝi al tiu servo je 20.000 BF por unu paĝo dum 1994. Post enketo kaj konstato de etskala uzo ni decidis ne aboni ĝin.

9. Strategiaj planoj de FEL kaj la centro : RR organizos diskuton tiuteman je la tago de internacia amikeco en Blanden (apud Loveno) je la 19 feb 1994 inter la 10a kaj 12a30. Skribitaj ideoj bonvenas ĉe RR.

10. Elektronika bultenejo : Per preskaŭ nula investo FEL povus disponi pri elektronika bultenejo. Ĝi funkcius per interaktiva programo kiun FEL jam posedas. Tiel ĉiuj posedantoj de komputilo ekipita per modemo povus konsulti ĉiajn informojn pri kunvenoj, aranĝoj, ktp kaj ankaŭ aktive mendi, lasi kontribuon por HT aŭ Monato ktp.
PP preparas provizoran modelon. Li ŝatus arigi kvinopon da interesitoj en laborgrupo kiu testus kaj definitivigus la modelon. Kandidatoj anoncu sin.

11. Venontaj kunvenoj : 22 jan (mastruma) kaj 26 mar (mastruma kaj strategia). Ekde 8a30 financoj, ekde 10a aliaj punktoj.

12. Ĝenerala kunveno : Je la 26a de marto 1994 je la 14a horo en la centro.

## Adresaro

Eric Baert, rue des Taillis 23, 1420 Braine L'Alleud
Jorg De Mulder, Beauvoislaan 86, 2920 Kalmthout, (03) 666 95 98
Grupo Esperantista, Barrenkale Barrena 7-1, 48005 Bilbo, Eŭskio (Hispanio)
Alex Humet, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, (03) 239 21 69, telekopiilo (02)217 56 60
Paul Peeraerts, vidu la adreson de la E-centro sur kovrilo
Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, (050) 33 00 04 (telekopiilo post la 10a sonoro)
Edward Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3520 Houthalen, (011) 52 19 43
Pieter Vets, Wapenhaghestraat 19, 2600 Berchem, (03) 239 73 67
Raymond Wylleman, A. Verneylenstr. 65, B-8400 Oostende

# Monato

multaj kialoj por legi ĝin ĝuste **nun**!




Mendu provekzempleron ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio